

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO



DUA EPOKO - JARO II^a : DECEMBRO 1922

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE LA

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

Jarkotizo : 5 pesetoj

GRUPOJ ALIGINTAJ AL K. E. F.

BARCELONA STELO, Marqués del Duero, 101	BARCELONA
NOVA SENTO, Enna, 156	BARCELONA
PACO KAJ AMO, Asturias, 1	BARCELONA
SEMO (A. E. P.), Carme, 30	BARCELONA
LA RONDO, Provença, 131	BARCELONA
ESPERANTAJ KANTISTOJ, Baix de S. Pere, 77	BARCELONA
LA METIISTO, Travessia S. Antoni, 22	BARCELONA
LUMON, Carrer Major, 36	TERRASSA
ESPERANTISTA JUNULARO,	TERRASSA
GERONA ESPERO, Ajuntament,	GIRONA
STUDENTA JUNECO, Seminari,	GIRONA
APLEC «ESPERANTA GRUPO», Mendizábal, 3	SABADELL
BELA ESPERO, Carretera de Vich, 41	MANRESA
NOVA SEMO, Major, 15	REUS
LABORO ESPERANTA, S. Antoni, 1 i 3	VILANOVA I GELTRÚ
ESPERANTA IDEALO, Mn. Cinto Verdaguer, STA. COLOMA DE FARNÉS	
REGENERACIO, Centre Obrer de Cultura «Floreal»	SALT
EMPORDANA EBENAJO,	ARMENTERA
ESPERANTA NESTO, «Joventut Catòlica»,	RIPOLLET
ESPERANTISTA AMIKECO, Plaça Bernardi, 10	MANLLEU
FRATECO, P. Pi i Margall, 14	VENDRELL
ESPERANTISTA KLUBO «PALMA» Misi6n, 5	PALMA DE MALLORCA
TARRAGONO ESPERANTA, Uni6, 9	TARRAGONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas ĝutaro*

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Vojaĝaj impresoj

PARIS

TEN ĝi estas! 51, Rue de Clichy. La centro de Esperanto: la ĉie konata loko, kie de antaŭ multaj jaroj oni regas, gvidas, organizas Esperantismon.

Mi jam unufoje estis vizitinta la Centran Oficejon. Sed pasis, forflugis tiom da jaroj ke mi dubis ĉu mi devas resti en la unua etaĝo aŭ supreniri en la altajn.

Ĉu vi serĉas «Esperanton»? diris al mi la afabla pordistino, signante la verdan steleton kiun mi fiere portis ĉe la butontruo. Iru al la tria! Ĵus enirinta, la konata vizaĝo de mia malnova konitino, F-ino Gérard, memorigis min ke mi ne plu estas en eks-terlando. Mi troviĝis en angulo de Esperantujo, tiu vasta lando sen limoj, kie ĉiu konato estas via amiko, kie ĉiu alparolato estas via kamarado.

Jam interne, agrabla surprizo atendis min.—Ho, kiel vi dikiĝis—interrompis Barono de Ménil, la famekonata aŭtoro de la Espero;—jes, sed de nia lasta intervidiĝo dum la Antwerpena kongreso pasis jam 11 jaroj, sinjoro Barono, dek unu jaroj dum

kiuj krom entuziasmo mi amasigis grason! — Verŝajne estis Barcelono la loko de nia lasta intervido, ĉar mi ne estis en Antwerpeno. — Eble; la tempo nebuligas la memoron, kaj...

En apuda ĉambro, klinita la kapo antaŭ amason da dokumentoj, la respektinda figuro de Generalo Sebert vundis mian rigardon. Ne pasis la jaroj por la Generalo: aktiva, ĉiam laborema, lia mieno enpenetranta en la skribaĵaron, ŝajnis al mi kvazaŭ personiĝinta realaĵo de la konstanta laboro!

Malgraŭ siaj 85 jaroj, li senĉese okupiĝas pri Esperanto. Certe liaj kruroj ne permesas fari la longajn vojaĝojn de antaŭ jaroj por ĉeesti la kongresojn, sed lia cerbo ĉiam vigla, daŭrigas konstante la laborojn por nia kara lingvo internacia. Por ĉiu konato, lí havas demandon; kiel fartas S-ro A? ĉu ankoraŭ S-ro B konservas la entuziasmon? kaj S-ino C? En la daŭro de kelkaj minutoj ni revidas kvazaŭ en filma revuo, la agrablajn momentojn pasigitajn dum la Barcelona kongreso...

Mi volas reviziti la ejon kie Esperanto konserviĝas. Post rapida irado tra la ĉambroj, post ekzameno de l' interesaĵoj (ekzemple tuta kolekto de ĉefeĉaj ŝlosiloj inter kiuj «Kataluna») kaj post—nemeritita honoro—surskribo en la Ora Libro, mi adiaŭis miajn amikojn, promesinte antaŭe al ili ke mi ĉeestos la monatan kunvenon de la «Verda Kato», la fama Pariza Kabareto.

Mi loĝis en hotelo apud Boulevard Poissonnière, do la strato Bonne Nouvelle ne estas tre malproksima... — «Kafejo Andréas»: sendube estas tie ĉi. Ni eniru! Ni sidu; ni trinku! Ni tro fruis. Mankas almenaŭ unu kvarono da horo por la kunsido... Sed apenaŭ pasis dek minutoj, kiam paro da gejunuloj alproksimiĝis: eble vi estas esperantistoj, sinjoroj? La demandinto, poste mi ĝin sciis, estis la «katego» de 'l kabareto, simpatia S-ro Schwartz, poeto, kanzonetisto, aŭtoro de plenumoraj versaĵoj kiuj estas kvazaŭ la pipro inter la esperanta ĉiutaga prozo; kaj lia akompanantino, F-ino, f-ino... pardonu ke mia cerbo forgesis vian nomon sed ne miaj okuloj vian belvizaĝon... la Sekreta-riino.

La kunsidon ĉeestis trideko da personoj, kiuj, post pritrakto de seriozaj temoj koncerne la katan vivon, bonvolis regali min per kantado de poemoj de S-ro Schwartz kun akompana rekanta-

ĵo de ĉiuj verdkatanoj. Belaj momentoj! Dio konservu al vi vian bonhumoron!

Antaŭ mia foriro, mi volis saluti S-ron Cart, nia Akademia Prezidanto, iom priokupita pri la fama cirkulero de l' franca Ministro kontraŭ Esperanto, ankaŭ ĉeestanta la kunvenon, kaj denove resalutis S-ron Baronon de Ménil, F-inon Gérard, S-ron René de Lajarte... kaj ĉiujn.

BERLIN

Dudek du horoj da vagonaro estas tro laciĝaj. Ni iru dormi kelkajn horojn kaj morgaŭ ni vidos ĉu estos eble aranĝi kunveneton por paroli pri la historia movado de Esperanto en Katalunujo kaj pri la belaĵoj de nia urbo.

La Societo por Altiro de Fremduloj, eksciinte pri mia vojaĝo, estis proponinta al mi la okazigon de paroladoj pri la belaĵoj de nia urbo, en la esperantistaj centroj; eĉ por fari pli interesaj tiujn paroladojn, ĝi estis metinta al mia dispono kolekton de kelkaj dekoj da kliŝoj zorge elektitaj, kiuj, projekciitaj per elektraj lanternoj, donus al la parolado, krom intereso, amuzon kaj agrablon.

Por tio, mi kalkulis kun la helpo de U. E. A., tiu vasta organizaĵo kiu dissemis konsulojn, delegitojn kaj reprezentantojn en la kvin partojn de la mondo. Kaj ĝia konsulo en Berlin, S-ro Sweiger, akceptis min tre afable, sciigante min ke bedaŭrinde ne estos eble aranĝi la projektitan kunvenon, pro tio ke la Berlina samideanaro, pro la nunaj malfavoraj cirkonstancoj, kaj ne trovante ejon por kunveni, estas devigata kunveni en «Konfitejo» (!) unu fojon ĉiumonate, kaj kompreneble, inter kukoj kaj sukeraĵoj ne estas dece paroli pri seriozaj temoj.

Mi intencis tamen ĉeesti la kunsidon, kaj iris al loko montrita de S-ro la Delegito: sed ve! la adreso donita al mi estis nur «apud Zoologia Ĝardeno» kaj malgraŭ mia duonhora demando al promenantoj, policistoj, trairantoj, neniu sciis diri al mi kie estas la fama loko kie oni «faras» Esperanton kaj samtempe oni regalas sin per plej bongustaj sukeraĵoj: unu *strasse* kaj unu numero estus min helpinta multe pli ol la servoj de U. E. A.

J. BREMÓN MASGRAU

La Vero

(Fabelo de S. Frug)

Tedis Veron vivi en ĉielo,
Super steloj, dia en kastelo,
Aŭdi himnojn de l'angela ĥoro
Pri la paco, pri kviet' en koro.
Volis iri Ver' al la libero,
Al pekanta sur la ter' homaro,
Al mallumo, al la malespero,
Al dolor', pasioj kaj eraro.

Eksciinte ĝin Feliĉo diras :
«Tiun bonon ankaŭ mi deziras
«Helpi; tere mi labori penas
«Kaj anoncos ke vi baldaŭ venos.
«Larĝan vojon mi al vi preparos,
«Altan, belan domon mi konstruos;
«Al dispono via ĉio staros,
«Tie regos vi, justecon ĝuos».

Sur la teron jen Feliĉo venas
Kaj agadi nevidite penas.
Jen kabanon venas de paŝtisto,
Hejmon jen de karbolaboristo —
Tuj ekbrilos oro sur la tero,
Kvazaŭ lumas steloj de l'espero.
Al blindul' okulojn jen ĝi blovas,—
La blindul' senhelpe vojon trovas.
Helpas ĝi al Jano la Stultulo,
Loĝas jam kastele Jan' riĉulo...

Nun mirante homoj vidas ĉie,
Ke fariĝis en la mond' alie.
Sed Feliĉo ilin ja blindigas :
Per potenco ĉion ĝi lumigas.
Kiam ĝi foriras, maljusteco
Venas ree, ankaŭ humileco.
Al la homoj nur decido restas:
«ĉiam kun Feliĉo Vero estas...»

Nun Mizerero al la Vero diras:
«Min al la homaro io tiras,

«Sendu min, kaj certe mi sukcesos.—
«La Feliĉon homoj tuj forgesos,
«Ili amos nur la sanktan Veron,
«Ŝatos ili vin kaj vian peron».
— «Iru dol!» respondis sankta Vero.
Kaj foriris teren la Mizerero.

Malriĉulojn jam Mizer' vizitas,
Ankaŭ riĉajn ofte ĝi incitas.
Ne frapante domojn ĝi eniras
Kaj la korojn per malĝojo ŝiras.
Dian lumon neniigas blinda
La Mizerero ĉie, malaminda.

Multajn landojn vidis la Mizerero,
Multaj larmoj fluis sur la tero —
La homaro stranga nun fariĝas,
Antaŭ la Mizerero ĝi kliniĝas...
— «Kiel do?» ekmiras la saĝuloj
Kunveninte kun la maljunuloj.
Ili priparolas kaj konsentas :
— «Certe al homaro evidentas,
«Ke troviĝas ĉiam tie Vero,
«Kie senkompata la Mizerero»...

De post tiam sur la tero nia
Estis veroj du, — miraklo kia!
En malnova nur popolfabelo
Estas rakontite pri la belo,
Pri la sankta, dia Vero nura,
Kiu longe kun la sento pura
De sur tero atendanta estis
De l' sendit' revenon. Fine restis
Nun ĉiame Vero en ĉielo,
Super steloj, dia en kastelo.

El rusa lingvo tradukis

PAUL MEDEM

Kelkaj Ĉapitroj el "Quatrevingt-treize"

de Victor Hugo



BOISBERTHELOT ne havis tempon respondi al La Vieuville. La Vieuville aŭdis sian parolon subite rompitan de malespera ekkrio, kaj samtempe bruo audiĝis neniel simila al ordinaraj bruoj. Tiu krio kaj tiuj bruoj venis el interno de la ŝipo.

La kapitano kaj la leŭtenanto alkuris al interferdeko, sed ili ne povis eniri. Ĉiuj kanonistoj resupreniris freneze.

Teruraĵo estis okazinta.

IV

TORMENTUM BELL

Kanono el la baterio, pafilego de dudek-kvar centimetroj, estis sin liberiginta.

Tiu estas eble la plej timinda mara akcidento. Nenio pli terura povas trafi militŝipon en plena marveturo.

Kanono rompinta sian ligilon fariĝas subite supernatura besto. Ĝi estas maŝino kiu aliformigas sin en monstron. Tiu maso kuras per siaj radoj, havas movojn de bilarda globo, pendas pro balanciĝo, profundiĝas pro tangado, iras, venas, haltas, ŝajnas mediti, reprenas sian ruladon, kvazaŭ sago trakuras la ŝipon de unu al alia pinto, turniĝas, apartiĝas, ŝteliĝas, ekstaras, ektuŝas, rompas, mortigas, detruas. Ĝi estas ŝafo laŭ sia bontrovo frapanta muron. Aldonu ankoraŭ: la ŝafo estas fera, muro ligna. Ĝi estas la liberigo de la materio; oni dirus ke tiu eterna sklavo sin venĝas; kvazaŭ la malboneco koviĝanta en tio kion ni nomas senanimaj objektoj subite eliĝas kaj eksplodas; kvazaŭ ĝi senpacienciĝis kaj entreprenas nun strangan malklaran revenĝon; nenio pli malindulgema ol kolero de senanimaĵo. Tiu furioza bloko havas saltojn de pantero, pezecon de elefanto, rapidecon de muso, obstinecon de hakilo, surprizon de marondo, subitecon de fulmo, surdecon de tombo. Ĝi pezas dek mil kilogramojn kaj resaltas kiel infana pilko. Ĝi turniĝas rapidege kaj subite haltas. Kaj kion fari? Kiel ĉesigi tion? Stormo ĉesas, ciklono pasas, vento haltas, rompitan maston oni anstataŭas, akvan fluon oni ŝtopas, brulado estingiĝas; sed kion fari kontraŭ tiu grandega bruto el bronzo? Kiel agi kontraŭ ĝi? Vi povas logi dogon, mirigi taŭron, sorĉi boaron, timigi tigron, kortuŝi leonon; neniu alpaŝo al tiu ĉi monstro, kanono kolera. Vi ne povas mortigi ĝin, jam senviva ĝi estas. Kaj samtempe ĝi vivas. Ĝi vivas per terura vivo venanta el la senfino. Ĝi havas sub si sian plankon kiu balancas ĝin. Tiun skuas la ŝipo, kiu estas skuata de la maro kaj tiu ĉi de la vento. Tiu ekstermisto estas ludilo. La ŝipo, la ondo, la blovoj, ĉio ĉi regas ĝin; tial ĝia timiga vivo. Kiel agi kontraŭ tiu kunligo? Kiel

malakordigi tiun monstran meĥanisman de subakviĝo? Kiel antaŭvidi tiujn irojn kaj revenojn, tiujn reirojn, haltojn, kontraŭbatojn? Ĉiu el la kontraŭbordaj frapoj povas enfundi la ŝipon. Kiel diveni tiujn timigajn komplikajn movojn? Oni batalas kontraŭ kuglego kiu entuziasmiĝas, kiu havas mienon penseman, kaj kiu ĉiumomente ŝanĝas sian direkton. Kiel haltigi tion kion oni devas eviti? La terura kanono moviĝas, antaŭeniras, returnen venas, dekstren batas, maldekstren frapas, forkuras, pasas, konfuzas la atenton, forbalaas la baron, pereigas homojn kiel muŝojn. Tuta teruro de la situacio kuŝas en la moveco de la planko. Kiel batali kontraŭ klinebenaĵo kapricema? La ŝipo portas, por tiel diri, en la ventro la enfermitan pulvon kiu celas eliĝi; io kvazaŭ tondro rulanta sur tertremo.

En unu momento la tuta ŝipanaro ekstaris. Kulpa estis la kanonestro kiu forgesis streĉi la ŝraŭbingon de la ligoĉeno kaj malperfekte fiksas la kvar radojn de l' kanono; tio kaŭzis moviĝon de la plando kaj ĉasio, malakordigis ambaŭ plataĵojn kaj fine rompis la ĉenon. La kanonŝnuro estis rompita, tiamaniere ke la kanono ne plu estis fiksita al la afusto. La fiksa meĥanismo kiu malhelpas la retroiron, ne estis ankoraŭ uzata en tiu epoko. Marbato ekfrapis la embrazuron, la malbone fiksita pafilego returneniris, rompis sian ĉenon kaj terurige ekvagas sur la interferdeko.

Por kompreni tian strangan glitadon, oni imagu akvoguton kurantan sur vitroplato.

En la momento kiam la ĉeno rompiĝis, la kanonistoj ŝtaris ĉe la batario. Unuj grupe, aliaj dise, okupiĝis pri la marlaboroj de maristoj antaŭvidantaj batalan okazon. La kanono, ekpuŝita de l' tangado, fendis truon en tiu grupo kaj de l'unua ekbato dispremis kvar homojn, poste prenita kaj sendita de la balanciĝo, ĝi duonigis alian malfeliĉulon kaj aljetis kontraŭ babordan parion pecon de la baterio malmuntita. El tie venis la ĵus aŭdita angorkrio. Ĉiuj homoj sin alpremis sur la ŝtuparo. La baterio senhomiĝis laŭ rapideco de okulfermo.

La grandega maŝino estis forlasata. Ĝi estis tute libera. Ĝi estis sia mastro kaj mastro de la ŝipo. Ĝi povis agi laŭvole. Tuta ŝipanaro kutiminta al rido dum batalo tremis. Priskribi la teruron estas neeble.

Kapitano Boisberthelot kaj leŭtenanto La Vieuville, du kuraĝuloj tamen, haltis ĉe l' supro de la ŝtuparo, kaj mutaj, palaj, hezitantaj, rigardis la interferdekon. Iu kubutdisigis ilin kaj malsupreniris.

Tiu estis ilia pasaĝero, la civilulo, la viro pri kiu ili parolis ĵus antaŭ momento.

Atinginte la malsupron de l' ŝtuparo li haltis.

V

VIS ET VIR

La kanono iris kaj venis sur la interferdeko. Oni dirus la vivanta ĉaro de l' Apokalipso. La marlanterno ŝanceliĝanta aldonis al tiu vizio rapidegan

turniĝon de ombro kaj lumo. La formo de l' kanono malpreciziĝis pro la rapideco de ĝia kurado, kaj ĝi aperis aŭ nigra en la heleco aŭ reflektanta senkonturajn helaĵojn en la mallumo.

Ĝi daŭrigis la detruadon de la ŝipo. Ĝi estis jam frakasinta kvar aliajn kanonojn kaj en la pario fendinta du truojn, feliĉe super la floslinio, sed tra kiuj enverŝiĝos la akvo en okazo de ventego. Ĝi freneze rulis sur la planko; la tre fortikaj traboj rezistis, kurbaj lignaĵoj havas specialan solidecon; sed oni aŭdis ilian krakadon sub tiu neordinara klabo, frapanta, kun neaŭdita vigleco, ambaŭ flankojn samtempe. Plumba grajno skuata en botelo ne kaŭzas pli rapidan kaj frenezan perkutadon. La kvar radoj pasis kaj repasis sur la mortigitaj homoj, ilin dividis, dispecigis kaj tranĉis, kaj el kvin kadavroj ĝi elfaris dudek stumpojn rulantajn sur la baterio; la senvivaj kapoj kvazaŭ kriadis, sangofluoj tordiĝis sur la planko laŭ balanciĝoj de l' ŝipo. La riparo, diversloke difektita, ekmalfermetiĝis. La tuta ŝipo estis plena de monstra bruo.

La kapitano reprenis tuj sian malvarmon, kaj laŭ ordono lia oni ĵetis trans la krado-fenestro sur la interferdekon, ĉion kio povos mildigi kaj malhelpi la senbridan kuradon de l' kanono, matracojn, hamakojn, velojn, ŝnuro-rulojn, sakojn de la pasaĝeroj kaj ligaĵojn de falsaj asignatoj da kiuj la korveto estis plene ŝargita. Sed por kio taŭgos tiuj ĉifonoj se neniu kuraĝas malsupreniri por ilin konvene dismeti? Post kelke da minutoj ĝi estis jam ĉarpio.

La maro estis sufiĉe malkvieta por ke la akcidento estu kiel eble plej kompleta. Ventego estus ja dezirinda; ĝi eble renversus la kanonon kaj kiam la kvar radoj estus levitaj, facile oni ĝin regus.

Dume la detruado pligraviĝis. Elŝeliĝoj kaj eĉ rompiĝoj trafis la mastojn, kiuj enpremataj en la ĉarpenaĵo de la kilo, traboras la ŝipetaĝojn kaj aspektas kiel rondaj fostegoj. Pro la konvulsiaj frapoj de l' kanono, la antaŭa masto difektiĝis, la granda masto mem estis ekvundita. La baterio el-artikiĝis. Dek kanonoj el trideko estis senuzigitaj; la breĉoj en la pario multbliĝis, kaj la akvo enverŝiĝis jam en la korveton.

La maljuna en la interferdekon malsuprenirinta pasaĝero ŝajnis ŝtona viro staranta sur la sojlo de l' ŝtuparo. Li turnis sur tiun ekstermadon severan alrigardon. Li neniom moviĝis. Neeble ŝajnis fari paŝon en la baterio.

Ĉiu movo de la kanono en libereco minacis enfundi la ŝipon. Ankoraŭ kelke da momentoj kaj subakviĝo estos neevitebla.

Decis perej aŭ ĉesigi tuj la malfeliĉon; preni decidon; sed kiun?

Kia batalisto tiu kanono!

Oni devis haltigi tiun terurigan frenezulon.

Oni devis kvietigi tiun fulmotondron.

Boisberthelot diris al La Vieuville:

—Ĉu vi kredas al Dio, kavaliro?

La Vieuville respondis:

—Jes. Ne. Kelkafoje.

—Ĉu en la ŝtormo?

—Jes. Kaj en momentoj kiel ĉi-tiu.

—Efektive, nur Dio povas ja nin elsavi, diris Boisberthelot.

Ĉiuj silentis, lasante al la kanono fari sian teruran bruadon.

Ekstere la ondoj frapantaj la ŝipon, respondis al frapo de l' kanono, per marbatoj. Oni dirus du alternantaj marteloj.

Subite, en tiu speco de nealirebla cirko kie saltegis la liberiginta kanono, oni vidis viron aperantan, kun fera vergo en mano. Li estis la aŭtoro de la katastrofo, la batericstro kulpa de malzorgo kaj kaŭzo de la akcidento, la mastro de l' kanono. Farinte la malbonon, li volis ĝin rebonigi. Li prenis handspikan stangon per unu mano, per la alia droson kun glitanta knoto, kaj eksaltis trans la krado sur la interferdekon.

Tiam sovaĝaĵo komencis; titana spektaklo; lukto de l' kanono kontraŭ la kanonisto; la batalo de la materio kaj la inteligento, duelo de objekto kontraŭ homo.

La viro staris en angulo, kaj kun vergo kaj ŝnuro en ambaŭ siaj pugnoj, ŝirmata, firma sur siaj kruroj kvazaŭ paro da ŝtalfostoj, pala, kvieta, tragedia, kvazaŭ enradikita en la planko, li atendis.

Li atendis preterpason de la kanono.

La kanonisto konis sian pafilegon kaj al li ŝajnis ke tiu devas lin koni ankaŭ. Li kun ĝi vivadis jam de longe. Kiom da fojoj la manon li metis en ĝian faŭkon! Ĝi estis lia familia monstro. Li alparolis ĝin kiel sian hundon. —Venu, diris li. Eble li amis ĝin.

Li ŝajnis deziri ke ĝi venu al li.

Sed veni al li, tio estas veni sur lin. Kaj tiam li estos mortigata. Kie eviti la premegon? Tie kuŝis la demando. Ĉiuj rigardis terurite. Eĉ ne unu brusto libere spiris, krom eble tiu de l' maljunulo kiu sola staris en la interferdeko kun ambaŭ batalantoj, malfeliĉa atestanto.

Lin mem povis la kanono dispremi. Li neniom moviĝis.

Sub ili la ondar, blinda, direktis la batalon.

En la momento kiam, akcentinte la timigan duelon, la kanonisto ekin-citis la kanonon, pro hazardo de marbalanciĝo tiu restis momenton senmo-va kaj kvazaŭ miranta.—Venu, do! al ĝi la homo diris. Ĝi ŝajnis aŭskulti.

Subite ĝi saltis sur lin. La viro evitis la frapon.

Lukto komencis. Lukto neniam aŭdita. La rompeblo sin puŝanta kontraŭ la nerompeblo. La karna estaĵo atakanta la bronzan bruton. Unuflanke forteco, aliflanke animo.

Ĉio-ĉi okazis en duonombro. Ĝi estis kiel malpreciza vizio de mirindaĵo.

Stranga afero, oni dirus ke la kanono havas ankaŭ animon; sed animon de malamo kaj furiozo. Tiu blindaĵo kvazaŭ posedis okulojn. La monstro ŝajnis subobservi la homon. Ekzistis, almenaŭ oni tiel pensus, ruzo en tiu maso. Ĝi ankaŭ elektis sian momenton. Ĝi estis ia giganta fera insekto reale aŭ ŝajne posedanta diablan volon. En unu sekundo tiu kolosa akrido

ektuŝis la malaltan plafonon de la baterio, poste ĝi refalis sur siajn kvar radojn kiel tigro sur siajn ungegojn kaj ekkuris denove sur la homon. Li, vigla, facila, atentema, tordiĝis kiel kolubro je tiuj fulmorapidaj movoj. Li evitis la renkontojn, sed la frapoj de li evititaj falis sur la ŝipon kaj daŭrigis la detruadon.

Peco de rompita ĉeno restis alkraciita al la kanono. Tiu ĉeno ruliĝis oni ne scias kiel ĉirkaŭ la pivota ŝraŭbo de l' postumo. Unu ekstremo de la ĉeno estis fiksita en la afusto. La alia, libera, turniĝis freneze ĉirkaŭ la kanono kies bruigadon ĝi pligrandigis. La ŝraŭbo kiel fermita mano tenis ĝin kaj tiu ĉeno, aldonanta al batoj de ŝafa batojn de rimeno, faris ĉirkaŭ la kanono teruran kirlon, fera skurĝo en bronza pugno. Tiu ĉeno komplikis la lukton.

Tamen la viro batalis. Eĉ, kelkafoje, estis la homo kiu atakis la kanonon; li alrampis laŭlonge de la bordo, kun siaj vergo kaj ŝnuro en la mano; la kanono ŝajnis kompreni, kaj kvazaŭ antaŭvidante ruzajon, forkuris. La viro, timinda, sekvis ĝin.

Similaj okazoj ne povas longe daŭri. La kanono kvazaŭ diris al si subite: Nu! Decas ĉesigi tion! Kaj ĝi haltis. Oni antaŭvidis la finiĝon de l' batalo. La kanono kvazaŭ ripozante, ŝajnis havi aŭ reale havis, ĉar por ĉiuj ĝi estis vivantaĵo, sovaĝan antaŭmediton. Subite, fulme, ĝi sin ĵetis sur la kanoniston. La kanonisto flankeniĝis, lasis al ĝi preterkuri, kaj vokis laŭte ridante: Ĝis denove! La kanono, kvazaŭ koleriĝinta, rompis babordan kanonon; poste pelita de la nevidebla ĵetilo kiu ĝin regis, ĝi ruliĝis dekstren sur la homon, kiu sin forŝovis. Tri kanonoj estis detruitaj de la terura puŝego; tiam, kvazaŭ blinda kaj senkonscia, ĝi deturnis sin de la homo, ruliĝis de antaŭe al malantaŭe kaj malfermis breĉon en la ŝipantaŭan parion. La viro rifuĝis apud la ŝtuparo, je kelke da paŝoj de la maljuna atestanto. La kanonisto tenis sian handspikan vergon preta. La kanono ŝajnis lin ekvidi kaj sen turniĝo retroiris sur la homon kun subiteco de hakilbato. La homo premita al la bordo estis perdota. La tuta ŝipanaro eligis krimon.

Sed la maljuna, ĝis tiam senmova, pasaĝero, sin ĵetis, mem pli rapida ol tiuj sovaĝaj rapidecoj. Li estis kaptinta ligaĵon de falsaj asignatoj, kaj kun risko de dispremo, alŝutis ilin inter la radojn de l' kanono. Tiun decidan kaj danĝeran movon ne efektivigis kun pli da ĝusteco kaj rapido viro hardita de ĉiuj ekzercoj priskribitaj en la verko de Durosels pri la Manovro de la Mara Kanono.

La ligaĵo efikis kiel ŝtopilo. Ŝtoneto haltigas blokon, arba branĉo devojigas lavangon. La kanonisto siavice profitante tiun timandan okazon, almetis sian feran vergon inter la radiojn de posta rado. La kanono haltis.

Ĝi pendis. La viro, per levilmovo de sia vergo, ŝancelis ĝin. La peza maso renversiĝis kun bruo de terenfalanta sonorilego kaj la homo rapida, degutanta de ŝvito, ligis la glitantan knoton de la droso al bronza kolo de l' faligita monstro.

Soldatoj kaj maristoj batis la manojn.

Ĉiuj ŝipanoj venis kun ŝnuroj kaj ĉenoj, kaj en unu momento la kanono estis alligita.

La kanonisto salutis la pasaĝeron.

—Sinjoro, li diris, vi savis al mi la vivon.

La maljunulo estis repreninta sian kvietan teniĝon kaj tute ne respondis.

VI

DU PLATOJ DE PESILO

La homo venkis, sed oni povas diri ke ankaŭ la kanono venkis. La baldaŭan subakviĝon oni evitis, sed la korveto ne estis sen danĝero. La difektado de l' ŝipo ŝajnis neriparebla. La ŝipbordaĵo havis kvin breĉojn, el kiuj unu tre granda en la antaŭo; dudek kanonoj el trideko kuŝis difektitaj. La kanono rekaptita kaj religita al la ĉeno estis ankaŭ netaŭga; la ŝraŭbo de la postumpivoto estis perfortita, kaj sekve la celigo neebla. La baterio estis malgrandigita je naŭ pafilegoj. En la holdo verŝiĝis akvo. Necese estis tuj akuri al averioj kaj funkciigi la pumpilojn.

La interferdeko, nun kiam oni povis ĝin rigardi, estis vidotimiga. La internaĵo de kaĝo de furioza elefanto ne estas tiel ruinigita.

Malgraŭ la bezono eviti la surprizon de la korveto, estis ankoraŭ pli urĝa tasko, la tuja sinsavo. Oni devis heligi la ferdekon per kelkaj lanternoj displantitaj en la bordaĵo.

Tamen, dum la longa daŭro de tiu tragedia akcidento, absorbita la ŝipanaro de afero de vivo aŭ morto, apenaŭ oni sciis kio okazis ekster la korveto. La nebulo densiĝis; la vetero ŝanĝiĝis; la vento direktis la ŝipon laŭ sia volo; oni veturis eksterveje, antaŭ Jersey kaj Guernessey, pli sude ol oni devus esti, oni troviĝis meze de malkvietiĝinta maro. Grandaj marondoj venis kisi la malfermitajn vundojn de la korveto, timiganta kizado. La balancado de l' maro estis minacanta. La marventeto fariĝis norda ventego. Ŝtormo, eble, prepariĝis. Oni vidis nenion kvar ondojn antaŭ si.

Dum la veturantoj riparis rapide kaj neperfekte la ruinojn de la interferdeko, ŝtopis la akvofluojn kaj pretigis por funkciado la kanonojn ŝparitajn de la malfeliĉo, la maljuna pasaĝero supreniris denove la ferdekon.

Li staris sin apoganta al la granda masto.

Li ne atentis pri movo okazanta sur la ŝipo. Kavaliro La Vieuville batalvicigis ambaŭflanke de la granda masto la soldatojn de marista infanterio, kaj je fajfilblovo de la estro, la maristoj okupataj en siaj taskoj stare rigidiĝis sur la jardoj.

Grafo de Boisberthelot antaŭpaŝis al la pasaĝero.

Post la kapitano marŝis viro malafabla, spireganta, vestoj en malordo, la mieno tamen kontenta.

Li estis la kanonisto kiu ĵus montriĝis tiel ĝusta dresisto de monstroj, kaj kiu kvietigis la kanonon.

La grafo faris al la civilvestita maljunulo militistan saluton kaj diris:

—Mia generalo, jen la viro.

La kanonisto staris, okuloj mallevitaj, kun laŭordona teniĝo.

Grafo de Boisberthelot reparolis:

—Mia generalo; antaŭ la faro de tiu ĉi homo, ĉu vi ne pensas ke por liaj ĉefoj estas io farota?

—Mi tiel pensas, diris la maljunulo.

—Bonvolu doni ordonojn, respondis Boisberthelot.

—Vi devas ilin doni. Vi estas la kapitano.

—Sed vi estas la generalo, aldonis Boisberthelot.

La maljunulo rigardis la kanoniston.

—Alproksimiĝu, li diris.

La kanonisto alpaŝis.

La maljunulo turnis sin al grafo de Boisberthelot, deprenis de la kapitano la krucon de Sankta Ludoviko kaj alpendis ĝin al la bluzo de la kanonisto.

—Hurra! vokis la maristoj.

La maristaj soldatoj prezentis la armilojn.

Kaj la maljuna pasaĝero, fingro-montrante la fierantan kanoniston, aldonis:

—Ke oni mortpafu nun tiun homon.

Mirego sekvis la aklamon.

Tiam meze de tomba silento, la maljunulo laŭtigis sian voĉon. Li diris:

—Malzorgo danĝerigis tiun ŝipon. En tiu-ĉi momento ĝi estas eble perdita. Esti en la maro egalvaloras esti antaŭ la malamiko. Ŝipo kiu faras traveturon estas armeo kiu batalas. La ventego sin kaŝas, sed ne forestas. La tuta maro estas embusko. Mortkondanno por ĉiu manko farita en ĉeesto de la malamiko. Ne ekzistas kulpo pardoninda. Kuraĝon oni devas rekompenci kaj malzorgon oni devas puni.

Tiuj vortoj falis unu post alia, malrapide, grave, kun speco de malindulgemo; kvazaŭ sur kverko frapoj de hakilo.

Kaj la maljunulo, rigardante la soldatojn, aldonis:

—Faru.

La homo sur kies vesto brilis la kruco de Sankta Ludoviko mallevis la kapon.

Je signo de grafo de Boisberthelot, du maristoj malsupreniris en la interferdekon, poste ili revenis kunportante la morttukon; la ŝippastro, kiu staris preĝante ĉe la kadro de oficiroj, akompanis ambaŭ maristojn, serĝento deprenis el la batallinio dekdu soldatojn kiujn li vicigis po ses laŭ du vicoj; la kanonisto, nenion diranta, sin metis inter ambaŭ. La pastro, krucifikso en mano, alpaŝis kaj sin lokis apud li.—Marŝu, diris la serĝento.—La malgranda patrolo direktis sin antaŭen laŭ malrapidaj paŝoj; ambaŭ maristoj, portantaj la morttukon sekvis ilin.

Melankolia silento fariĝis sur la korveto. Malproksima uragano blovis.

Post kelke da momentoj, pafu eksplodis en la malhelo, helaĵo pasis, poste ĉio silentis, kaj oni aŭdis la bruon de korpo falanta en la maron.

La maljuna pasaĝero ĉiam apogata al la granda masto, estis plektinta la brakojn, kaj revis.

Boisberthelot, montrante lin per fingro de sia maldekstra mano, mal-laŭte diris al La Vieuville:

—La Vendée havas ĉefon.

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ



Nova Revuo «Literatura Mondo»

Fondita de kelkaj eminentaj hungaraj samideanoj, komencis aperi, en la lasta oktobro, belega, grandformata, internacia monata revuo «Literatura Mondo».

«Kataluna Esperantisto», kiu pro sia nacia karaktero ne povas plenumi rolon de internacia literatura revuo, sed kiu fakte estas literatura revuo internacie interesa pro la apero sur ĝiaj paĝoj de la verkoj premiitaj en la Internaciaj Floraj Ludoj, varme salutas la novan gazeton kaj deziras al ĝi plenan sukceson.

La du numeroj de «Literatura Mondo» ĵus aperintaj estas promeso pri estontaj valorplenaj paĝoj de la esperanta literaturo. Ni esperas ke ĝi pleningos la mankon de multaj sentatan de post la malapero de «Lingvo Internacia» kaj «La Revuo».

La jarabono kostas 12 pesetojn. Adreso: Andrásy-ut 81, Budapest VI. Ni akceptas abonojn al «Literatura Mondo».

La Songô de l' Ekzilitino (*)



Mividis ilin ĉiujn, pene marŝantajn laŭlonge de la senfina vojo. Estis miloj kaj miloj da ili, kaj multaj pliaj miloj ankoraŭ venis poste. Ili marŝadis jam mejlojn post mejloj, kaj multajn pliajn mejlojn ili ankoraŭ devis marŝadi. Ili aperis lacaj, sub la pezo de siaj malgrandaj posedaĵoj, kaj, kvankam ili kunportis kelkajn manĝaĵojn, ili ne donis al si tempon por manĝi. Ili sentis nek malsaton nek lacecon, kaj ĉies vizaĝoj estis ridetantaj. Ili estis la ekzilitoj sur la vojo hejmen.

Estis tipa Belga vojo: la meza parto pavimita, kaj la vojflankoj plantitaj per arboj; laŭlonge de la vojrandoj, mallarĝa fosaĵo apartiganta la vojonojn de la kampoj. Ili jam estis marŝintaj laŭ la sama vojo kvar jarojn antaŭe, je la kontraŭa direkto, plorĝemantaj, kun larmoj en la okuloj kaj maldolĉaj sentoj en la koro, dum Germanaj bomboj sibladis super ilia kapo kaj kelkaj el la marŝadantoj okaze haltis por ĵeti rigardon malantaŭen al siaj forbrulantaj domoj aŭ al la loko, kie iliaj edzoj kaj patroj estis mortpafitaj.

Kaj nun ili ree marŝadis tie ĉi, en lando liberigita de la invadinto. Ili malamo ne forlasis ilin, ili nutros ĝin dum sia tuta vivo, kiel sanktan devon al sia martirigita Patrujo. Sed en tiu ĉi horo de la Granda Reiro ĉiu malamikemo estas forgesita, kaj ili daŭrigis rideti, ridetadi, tute laŭlonge de sia laciga vojaĝo.

Estis kvazaŭ vasta heleco supreniĝis de ili, formanta super ili longan horizontalan lumstrion kiu gaje kontrastis kontraŭ la dolormalheligita ĉielo; ĝi estis kvazaŭ la sintezo de la tuta ĝojo kaj la tuta espero koncentriginta en iliaj koroj aŭ flame ekbrilanta el iliaj okuloj. Ili alportis kun si la Lumon, kaj la Mallumo malaperis, kiam ili pasis.

Mi ajartenis al tiu homamaso, mi estis unu el ili. Kaj ofte, kiam mi malakcelis aŭ ree akcelis miajn paŝojn, mi neatendite renkontis parencojn aŭ amikojn, kiuj estis estintaj ekzilitoj kiel mi mem. Kaj estis kisado, kaj ĝojego! Kaj ĉie ĉirkaŭ mi estis similaj okazaĵoj. Ĉie feliĉaj renkontoj, feliĉaj kunigoj. Kaj el ĉiuj partoj de la lando, personoj, kiuj estis suferintaj dum tiuj longaj jaroj sub la jugo de l' tirano kaj subite sentigis liberaj, estis venintaj al tiu longa, longa vojo borderita per arboj, por iri renkonte al siaj rehejmiĝantaj karuloj. Jen mi vidas mian plej karan amikino! «Lucio! Vi tie ĉi! Kaj via filineto? Kaj via onklino? Kiom vi ĉiuj estas suferintaj! Ĉu via edzo estas ree hejme?» — «Ho, jes, li estas hejme! Jes, ni suferis, sed ĉio estas forgesita nun. Ni ĉiuj estas ree kunigitaj!»

(*) Verkita konforme al vera songo, tri monatojn ankaŭ la fino de l' Mondmilito.

Kaj poste mi vidis mian fraton. Mi kisis kaj ree kisadis lin. Mi neniam antaŭe estis tiel elmontrema al li. «Kie estas Patrino?»—«Vi baldaŭ trovos ŝin, ŝi estas nur iomete antaŭe». Kaj efektive mi trovis ŝin, ŝi ankaŭ estis reveninta. «Patrino! Kara patrinjo! Mamake!»

Kaj subite, pro la intensego de l' emocio, mi vekigis. Ho ve! estis nur sonĝo, la sonĝo de l' ekzilitino... Kiam, ho Dio! Kiam ĝi fariĝos realaĵo?

MARIA ELWORTHY - POSENAER

Premiita en la VIII.aj Internaciaj Floraj Ludoj.



Sarkistinoj

Ilin pasi mi vidis: tiel same
ĉe tagiĝo birdar' kun ĉarma trilo;
de ilia la ĝoj' pro mild-ekbrilo
al mi restis l' anim' ravita ame.

Papavoj sur la kap' kaj brust' orname;
el brakoj, floro-herba garbsimilo;
en iliaj vizaĝo kaj pupilo
feliĉo de juneco brilis flame.

Preterpasis kun kant'!... Vesper' finiĝis...
Disfumiĝe tre for, al mi vidigis
kun juneco kaj ĝoj', kun ĉarm' senpara...
kvazaŭ per lum' krepuska, sarkistinoj
estus, ĉizitaj sur marmor' malklara,
la friso de palaco de feinoj.

Katalune verkis M. MORERA I GALICIA

Tradukis JOSEF GRAU CASAS

El la Lingva Komitato

Paris 5 Nov. 1922

Kara Kolego,

Mi sendas al vi :

1.e La rezultaton de la voĉdonado de la Komitatoj :

a) pri Landnomoj,

b) pri la kreado de Akademiaj Korespondantoj.

2.e La plenan liston de la nunaj L. - Komitatoj.

VOĈDONADO PRI LANDNOMOJ

Post raporto de Prof. Grosjean - Maupin la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la demando : «Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia *uj'*» respondis :

9 jes 2 ne 1 duba voĉdono.

Al la demando : «Ĉu vi aprobas la fidelan sintenadon de la Akademio en la landnoma demando?» respondis 87 L. K - anoj.

74 (2 kun rezervoj) jes.

5 ne.

2 dubaj voĉdonoj.

6 sin detenis de voĉdono.

VOĈDONADO PRI KREADO DE AKADEMIAJ KORESPONDANTOJ

Al la demando : «Ĉu vi aprobas la kreadon de Akademiaj korespondantoj kaj rajtigas la Akademion elekti, se bezone, eĉ ne L-K-anojn?» respondis 87 L. Koj.

72 jes

8 (kondiĉe ke ili estu aŭ fariĝu L. Koj) jes

1 ne

6 sin detenis de voĉdono.

Sekve al nia Regularo estos aldonata jena paragrafo XII. 21 (in fine) :

«La Akademio havas la rajton elekti, eĉ ekster la L. K, se bezone, «Akademiajn korespondantojn — Se ili ne estas jam L. Koj, la Akademio «petas de la L. K. aprobon, dank' al kiu ili fariĝos L. Koj. — Ilia nombro ne «devas superi la trionon de la nombro de la Akademianoj.»

La elektoj en la L. K-aton okazos dum la unuaj monatoj de 1923—, en la Akademion poste, antaŭ la Nürnberga Kongreso.

Kun kora saluto via tre fidele

TH. CART

Prezidanto de la «Lingva Komitato»

ESPERANTAJ GAZETOJ

interŝange ricevataj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

- | | |
|--|-------------------------------------|
| Amerika Esperantisto, Boston | Konkordo, Zagreb |
| Arguso, México | Kristana Espero, Kaustinen |
| Aŭstria Esperanto-Raporto, Wien | La Eklezia Revuo, Huddersfield |
| Belga Esperantisto, Antwerpen | La Esperanto-Kolektanto, Wien |
| Bizantio, Konstantinopolo | La Espero, Stockholm |
| Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro | La Interŝango, Béziers |
| Brazila Vivo, Fortaleza-Ceará | La Nova Epoko, Moskvo |
| Bulgara Esperantisto, Sofia | La Policisto, Budapeŝt |
| Bulletin de la Société Française pour
la propagation de l' Esperanto, Paris | La Progreso, Plzen |
| Dia Regno, Quedlinburg | La Revuo Orienta, Tokio |
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio | La Semisto, Sabadell |
| Esperanta Finnlando, Helsinko | La Verda Ombro, Taihoku |
| Esperanto, Genève | Le Monde Espérantiste, Paris |
| Esperanto-Praktiko, Dresden | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento |
| Esperanto Triumfonta, Köln-Horrem | Liberio, Kioto |
| Espero Katolika, Udenhout | Literatura Mondo, Budapeŝt |
| Espero Teozofia, Praha | Literaturo, Wolwyn Garden City |
| Export Esperantist, Chicago | Litova Stelo, Kaunas |
| France-Esperanto, Paris | Marto, Haida |
| Germana Esperantisto, Dresden | Nova Eŭropo, Praha |
| Hispana Esperantisto, Madrid | Nova Tagiĝo, Genève |
| Holanda Esperantisto, Amsterdam | Pola Esperantisto, Warszawa |
| Hungara Esperantisto, Szeged | Sennacieca Revuo, Paris |
| Informa Bulteno de B. E. Ŝ., Barcelona | Skandinava Esperantisto, Rockford |
| Internacia Komerca Revuo, Zürich | Sveda Laborista Esperantisto, Gefle |
| Internacia Pedagogia Revuo, Antwerpen | Teristo, Moskou |
| Katolika Mondo, Graz | The British Esperantist, London |
| Katolika Sento, Venezia | Vegetarano, Hamburgo |
| | Verda Utopio, Osaka |



LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia Foiro
de Germanujo

—a unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj
por Tekniko kaj Konstrufako

Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto

Aŭtuna Foiro 1923 de la 26a de aŭgusto

ĝis 1a de septembro

Leip

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroŝicejo
por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG
